

[noto] fonto: "La Lumo Orienta", Jaro 2: N-ro 1, 1932

reapero: "La Japana Budhano", n-ro 385, 2017 (B.E. 2560)

Budhismo kaj Esperanto

Prof. Entai Tomomacu

Mi gratulas pro la fondiĝo de JBLE, epokfaranta movado en Japana Budhisma kampo kaj elkore esperas ĝian grandan sukceson. Ĉu estas vane esplori la rilaton inter Esperanto kaj Budhismo?

Unue mi volas citi ke Budhismo estas granda mondreligio plena de internacieco. Tion ni povas vidi en la misio de budhismo, farita de Reĝo Aŝoka en Orienta Hindujo kaj de Reĝo Kaniŝka en Centra Azio. Tiu ĉi karaktero jam montriĝas en la vortoj de Budho mem: - "Vi evitu iri duope sur unu vojo, por propagandi la Darmon, por savi transmigrantojn, kaj por plimulti la feliĉon de l' homaro." El ĉi tiuj vortoj ni povas diri ke la internacia karaktero devenas de Budha instruo mem. Kaj la ideo de la Granda Majstro estis bone efektivigita de la fervoraj misiistoj, kies laboroj atingis al Cejlono, Birmo, Hind-Ĥinujo, Javo kaj Sumatro en sudo; en okcidento al Malgranda Azio, kaj nuna Egiptujo; norde al nuna Rusujo, kaj aliflanke al Tibeto, Ĥinujo, Koreujo kaj ankaŭ al la malproksimorienta Japanujo.

Ankaŭ la Ĥina Budhismo, kiel oni bone scias, en sia plej frua stato, havis multe da internacieco. Kaj oni povas vidi la saman faktan en japana Budhismo ĝis la Aŝikaga-epoko (ĉ. 1400 -1600), sed ĉar la registaro de Tokugaŭa-ŝoguno alprenis la nacie izolitan politikon, ege timigite de la influo de *Kiriŝitan*, tiama Kristanismo, la japana Budhismo perdis sian tradician econ internacian, kaj fariĝis sklavo de ŝovinismo; budhismaj monaĥoj perdis sian povon prave kritiki naciajn aferojn, kaj fariĝis pupoj de l' aŭtoritataj personoj. Tamen oni povas bone rekoni ke tiu ĉi stato de Budhismo en Tokugaŭa kaj ties sekvantaj epokoj ne estis normala, se oni atente observus el la vidpunkto de historia procezo de la Budhismo.

Sed en la nuna epoko la internacieco de Budhismo, kiu sin kaŝis dum tre longa dormado de japanaj Budhistoj, fine ekvekiĝis kaj postulas ne nur sinliberigon de la obstina naciismo sed ankaŭ eniron en la eksterlandojn kiuj ankoraŭ ne scias Budhismon. Tamen se oni volus uzi sian gepatran lingvon kiel ilon de misio, oni ne povos atingi plenan sukceson, ĉar japana lingvo preskaŭ ne havas internaciecon, faciligi la sukceson. Tiu ĉi fakto estas same al ĉiuj nacilingvoj. Angla lingvo ne havas publikecon al ne-anglo-saksono; franca, germana aŭ aliaj lingvoj naciaj ankaŭ tute same ne estas facile komprenataj de alilandanoj. Pro tia kaŭzo ni povos prave proponi, ke ni nin turnu al Esperanto, mondlingvo pli facile komprenata kaj plej internacia en la nuna epoko, por propagandi Budhismon.

En la dirita signifo, mi opinias, ni ne devas neglekti la viglan movadon Esperantan, kiu rapide kreskas en inteligentuloj lastatempe. Estas ankaŭ rimarkinde ke la movado de l' lingvo estas ne nur internacia sed havas grandan karakteron religian; alivorte ni povas kompari la pacbatalantojn, esperplenajn kaj havantajn verdstandardojn en siaj manoj, kun la fervoraj misiistoj, vojaĝintaj al la tre malproksimaj landoj alte flirtigante la Darman standardon! Tiu ĉi internacieco plena de espero estas, mi opinias, komuna kun tiu de Budhismo.

Due mi volas citi, ke la budhisma dogmaro havas ian rilaton al Esperanto en la punkto de l' ideo de lingvo internacia. Budhismo postulas forigi la maljustan opinion egoisman, rufuzante arbitran agadon. Sekve ankaŭ en lingvaj aferoj, se iu lingvo persekutas la alian, alivorte kapitalisma arbitro troviĝus en aferoj lingvaj, oni devas forigi tian agadon nepuran, kaj postuli universalan, ĉie-taŭgan lingvon. Ni devas esti feliĉaj, ke ni povas trovi en nia sankta skribo la paragrafon, kiu klare asertas tiun ĉi opinion. Ĝi troviĝas en "Ekōttara-âgama" kaj montras al ni sekvantajn vortojn kiel unu el la elementoj de ideala mondo aŭ feliĉa lando de Majtreja Bodhisattva: -

"La lingvoj (de diversaj popoloj) fariĝos unu kaj samspeca, havante nenian diferencon inter si."

Ĉu Esperanto fariĝos la plej perfekta mondlingvo aŭ ne, tio estas demando, sed efektiviĝi tiun ĉi budhisman idealon t.e. klopodi por havi la perfektan internacian lingvon kaj ĝin bone utiligi estas almenaŭ tre grava afero, kaj tio signifas la unuiĝon en la originala ideo de Budhismo. Kompreneble la dirita ideo de Majtrejo estas citita kiel ideala formo, per kio, tamen, ni povas diri ke budhisma dogmaro havas ian rilaton al la Esperanta movado.

Trie ni devas rimarki, ke la esperanta movado jam ne estas distraĵo de burĝaro, nome ni ne devas neglekti rigardon al movado de proletoj kiuj efektive utiligas la lingvon kiel ilon de rigida unuiĝo de universala laboristaro, kiu devenas de la vortoj de Marx: "Unuiĝu laboristoj tutmondaj!"

Liberigi popolamason estas la originala misio de Budhismo, kiel oni bone scias, sekve ni devas partopreni kuraĝe al la supernaciisma mondpaca movado laŭ budhisma doktrino per Esperanto, unuiĝante kun la proletaro per tuta koro.

Kiel mi citis supre, ni povas klari vidi diversajn kaŭzojn, pro kiuj Budhismo devas konkonduki Esperanton.

Elkore mi gratulas pro la fondiĝo de la Ligo, kaj samtempe volas instigi la ekzezianojn, kiuj emas facile kliniĝi dekstren, ke ili pripensu pri la nova epoko, pri la vojo, kiun la nove leviĝinta klaso volas marŝadi, pri la internacia misio de Budhismo, kaj partoprenu al la Esperanta movado.

(libere tradukita el japana lingvo,
de ŜRII KAAŜJA KOŜMA)